

Informilo de Novembro 2015

Numero 19, Novembro 2015

Celoj por Daŭripova Evoluigo: Universala Esperanto-Asocio promesis sian subtenon

25 septembro. “Kiel organizaĵo dediĉita al internacia kunlaboro kaj interkompreniĝo, Universala Esperanto-Asocio deziras fari ĉion eblan por publikigi, subteni kaj realigi la Celojn por Daŭripova Evoluigo,” deklaris la reprezentanto de la Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj, profesoro Humphrey Tonkin, post kunveno kie oni anoncis la akcepton de la CDE fare de la 192-membra UN-organizaĵo. La kunveno, “De Tutmonda Konversaciado al Tutmonda Agado”, emfazis kaj la gravecon de agado por realigi la celojn kaj la bezonon engaĝi ĉiujn homojn en la procedo. Eĥante vaste proklamitan intencon, “Neniu persono estu postlasita,” deklaris Helen Clark, eksa ĉefministro de Novzelando, nun Administristo de la Evoluiga Programo de UN (UNDP). Ŝi substrekis la universalecon de la Celoj, kiuj transcendas kaj la unuopajn naciojn-ŝtatojn kaj eĉ normalajn internaciajn instituciojn.

“La inkluzivecon de la CDE estas samtempe ilia forto kaj ilia defio,” Tonkin asertis en sia postaj komentoj. “Ne simple temas pri tio, ke tutmonda agado devas sekvi el tutmonda konversaciado: la konversaciado devas okazi samtempe kun la agado – kaj devas engaĝi ĉiujn homojn, inter ili tiuj kies lingvoj ne estas vaste konataj kaj kies voĉojn oni malofte aŭskultas. Se ni vere deziras ion pli ol la kutiman desupran evoluigan iniciaton, ni devas lerni aŭskulti la diversajn lingvojn kaj mesaĝojn, ne simple instrukcii al ties parolantoj kion ili faru.”

Pli frue, en la inaŭgura parolado de la 82-a Itala Esperanto Kongreso en San Benedetto la 22-an de aŭgusto, la prezidanto de UEA, profesoro Mark Fettes, alvokis al la parolantoj de Esperanto, ke ili aliĝu al la klopodoj disvastigi la Celojn: “Konscie viciĝante inter la movadoj por daŭripova evoluigo, ni povos trovi novan sencon en nia esperantisteco kaj novajn direktojn kaj celojn por nia agado, loke, lande kaj internacie.”

Fettes tamen atentigis pri la neglekto, samtempe en formulado de la Celoj kaj en internacia evoluiga agado ĝenerale, de “la pli vasta signifo de multlingveco por daŭripova evoluigo, kaj la grandegaj obstakloj al edukado kaj komunikado kaŭzitaj de lingvaj diferencoj kaj lingva diskriminacio.” Li insistis, ke plej granda defio estos konservi lingvan diversecon kaj samtempe plibonigi dialogon, precipe inter la subprematoj kaj tiuj kiuj restas nereprezentataj.

“Jen kie nia Asocio povas fari diferencon kaj doni valoron al la procedo,” diris Tonkin. “Ni povas emfazi la gravecon de dudirekta komunikado kaj de la lingva dimensio de ekonomia kaj socia evoluigo.”

La Celoj por Daŭripova Evoluigo tradukiĝis en Esperanton kaj distribuiĝis tutmonde

3 novembro. Ekde “Forigi malriĉon ĉie, en ĉiuj ĝiaj formoj” (Celo 1) al “Plifortigi la realigajn kapablojn kaj revigligi la tutmondan partnerecon por daŭripova evoluigo” (Celo 17), teamo de lingvaj fakuloj tradukis la 17 Celojn por Daŭripova Evoluigo en la internacian lingvon, kaj Universala Esperanto-Asocio distribuis ilin tutmonde en la paĝoj de la Asocia organo Esperanto, kies novembra numero estis dediĉita al la Celoj. La celoj troviĝas ankaŭ ĉe la retejo de UEA http://www.uea.org/teko/un/dauripova_evoluigo_2030 kaj la retejo de la Novjorka oficejo de UEA, www.esperanto-un.org.

Krome:

- La Asocio estis regule reprezentata en kunsidoj de negistaraj organizaĵoj traktantaj la celojn, fare de Humphrey Tonkin, reprezentanto de UEA ĉe UN, Neil Blonstein, prizorganto de la oficejo de UEA en Novjorko, kaj aliaj anoj de la teamo de UEA, interalie Allison Thorsen.
- La Asocio publikigis mallongan klarigan dokumenton, “The Sustainable Development Goals: The Art of Translating Words into Change” (La Celoj por Daŭripova Evoluigo: La arto traduki vortojn en ŝanĝiĝon.” La dokumento emfazas, ke “traduki vortojn en agadon postulas lingvon,” kaj ĝi alvokas al UN dediĉi pli grandan atenton al la lingva dimensio de evoluigo – alvoko vaste ripetata en la faka literaturo de ekspertoj kiel ekzemple profesoro Suzanne Romaine, de la Oksforda Universitato, kaj eĉ de la Brita Konsilio, kunvokinto de konferenco pri lingvo kaj evoluigo okazanta en Nov-Delĥio en novembro.
- La Asocio tradukis en Esperanton, kaj vaste disvastigis, la mallongan oficialan videoprezenton de la Celoj: <http://www.esperantoporun.org/videoj/adopto-de-la-celoj-por-dauripova-evoluigo/>.
- Artikolo en la decembra numero de la revuo de la Asocio, Esperanto, alvokas al Esperanto-organizaĵoj subteni la Celojn por Daŭripova Evoluigo per konkreta agado.

Universala Esperanto-Asocio festis la 70-an jubileon de Unuiĝintaj Nacioj

3 novembro. En artikolo en la oktobra numero de la revuo de la Asocio, estrarano de UEA José Antonio Vergara, el Ĉilio, memorigas siajn legantojn pri la forta sindediĉo de Esperanto al konstruado de pli bona mondo kaj instigas subteni Unuiĝintajn Naciojn. Tiun senton ree emfazas la redaktoro de la revuo, Fabricio Valle, en redakcia artikolo en la novembra numero.

La Asocio esperantigis la videoprezenton de UN pri la 70-a datreveno, Fanfaro por ĉiuj popoloj, kaj proponis ĝian vastan uzon: <http://www.esperantoporun.org/videoj/fanfaro-por-ciuj-popoloj-70-a-datreveno-filmeto-de-la-un/>

La mesaĝo de la Ĝenerala Sekretario Ban Ki-moon okaze de la Tago de UN cirkulis en Esperanto-traduko, pere de la Gazetara Servo de UEA, al Esperanto-revuoj kaj aliaj novaĵmedioj tutmonde.

Novaĵoj pri lokaj kaj regionaj aranĝoj organizitaj de Esperanto-asocioj por festi la datrevenon alfluas el multaj mondopartoj.

Unesko denove rekonis Zamenhof, iniciatinto de Esperanto

18 novembro. La 38-a Ĝenerala Konferenco de Unesko finiĝis hodiaŭ en la sidejo de la monda organizajho en Parizo. Inter ĝiaj decidoj estis envicigo de la 100-a datreveno de la morto de L.L. Zamenhof (14-a de aprilo 2017) inter 53 datrevenoj kun kiuj Unesko estos “asociita” en la periodo 2016-2017. Propono pri tio estis farita de Pollando, kun subteno de Germanio kaj Slovakio. Temas pri plia rekono

de Unesko al Zamenhof post la rekono okaze de la 100-a datreveno de lia naskiĝo, kiam li estis proklamita “unu el la grandaj personecoj de la homaro”. Universala Esperanto-Asocio estis reprezentita en la Ĝenerala Konferenco de kvar observantoj: Renée Triolle, François Lo Jacomo, Oleksandra Kovyazina kaj Nathalie So Yun Kesler.

Inter aliaj datrevenoj rekonataj de la Ĝenerala Konferenco estis la ducenta datreveno de la morto de romanverkisto kaj eseisto Madame de Staël (Francio), la 2400-a datreveno de la naskiĝo de la filozofo Aristotelo (Grekio), la tricenta datreveno de la morto de la matematikisto kaj filozofo Gottfried Wilhelm Leibniz (Germanio) kaj la kvarcenta datreveno de la morto de la verkisto Miguel de Cervantes (Hispanio).

Esperanto-junulara organizaĵo estis reelektita al ICMYO

15 oktobro. Kadre de la jara kunsido de la Internacia Kunordiga Renkontiĝo de Junularaj Organizo, TEJO, reprezentita de la KER-aktivuloj Fernando Maia Jr. (Brazilo), Namir Rodriguez (Dominika Respubliko) kaj Miko Brandini (Usono), estis reelektita en la plenumorgano de la organizaĵo. IKRJO estas grava kaj influa reto, konsiderata de UN la voĉo de la junularo. TEJO reprezentas junajn Esperanto-parolantojn tra la mondo, organizas ĉiujarajn kongresojn, aperigas trimonatan revuon, kaj aktive kunlaboras por internacia interkompreniĝo.

Internacie konata juristo estis elektita al la Honora Patrona Komitato de UEA

1 oktobro. Giuliano Turone, el Italio, konata pro sia jura laboro en la fifama kazo de mafiano Michele Sindona, elektigis kiel ano de la prestiĝa Honora Patrona Komitato de UEA pro sia humaneca laboro kaj sia agado por Esperanto. Kiel juna juĝisto, li estis ligita al la pritrakto de pluraj altprofilaj kazoj pri publika kaj privata korupto. Poste li fariĝis ano de la Corte di Cassazione, la plej supera apelacia kortumo de Italio, kaj dum kelkaj jaroj rolis kiel prokuroro en la Internacia Krima Tribunalo por la iama Jugoslavio, post kio li fariĝis profesoro en la Katolika Universitato de Milano. Li aperigis plurajn itallingvajn librojn pri juro kaj estas konata en Esperanto-rondoj kiel aktoro en unupersonaj teatraj prezentoj kaj kiel honora prezidanto de la organizaĵo Esperanto por UN. Lia multlingva retejo Dante Poliglotta estas vaste vizitata kaj enhavas tradukojn de la poeto Dante en multaj lingvoj, en formoj teksta kaj voĉa. Profesoro Turone lernis Esperanton kiel junulo kaj aktivis en la organizaĵo de la Esperanto-junularo, TEJO.

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041

www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041